

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Ing-ro R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I * N-RO 14

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

MARTO 1933

Survoje al Konsilanta Gramatiko.

Redaktanto: Teo Jung.

Materialon por ĉi tiu rubriko oni direktu al s-ro Teo Jung, Brüsseler Str. 94, Köln, Germ.; ĉiun ceteran materialon destinitan por „Lingva Kritiko“ al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo.

Gramatikaj demandoj.

44. Participo: -ata aŭ -ita.

Io mi renkontis la jenan frazon: „Ortrezoro je valoro de kvin milionoj da dolaroj pereis kun la ŝipo »Orient«, dronigita de Nelsono en la marbatalo ĉe Abukiro.“ Kial dronigita? Ĉu dronigata ne estus pli korekta, ĉar la trezoro pereis, dum (aŭ kiam) la ŝipo estis dronigata. (M. W.)

45. Se — ĉu. (Komparu ankaŭ 12!)

En Pl. Vort. mi trovas (pĝ. 359): „mia feliĉo dependas de tio, se mi edziĝos kun ŝi.“ Ĉu ĉu anstataŭ se ne estas pli bona? Krome: „depende de tio, kiel (= laŭ tio, se) li al mi respondos.“ Mi ne komprenas la sencon de l' parenteza klarigo. Sur pĝ. 423 mi trovas: „laŭ tio, se la vetero estos bela aŭ malbela, ni iros promeni aŭ ne.“ Mi preferus ĉu—ĉu anstataŭ se—aŭ. Tia uzo de se, kiam montras la Pl. Vort., povas facile fari konfuzon: provu nur uzi se anstataŭ la qua ĉu en jena frazo: „Ĉu li vidos min, (tio) nur dependas de tio, se mi venos ankaŭ, ĉu li venos ĉu ne.“ (F. J. B.)

46. Prepozicio: al.

En Pl. Vortaro, pĝ. 283, mi trovas: „tion mi preferas al la manĝoj el kvirejoj de la plej bona hotelo.“ Kian direkton esprimas tiu al? Kial ne estas uzita: super (Pl. Vort.: super 2), je, antaŭ (laŭ la originala latina senco de „pre-feri“) aŭ ol? (F. J. B.)

47. Refleksivo.

En la romano „Anstataŭa edzino“ (11-a ĉapitro) mi trovis la jenan frazon: „Tio estas simplega,“ diris Julian, forgesante, en sia retransviliĝo, indigni pro la dubo pri lia veremeco.

Kaj jen alia frazo el la sama romano: Cara subite sentis la plankon kvazaŭ tremi sub ŝiaj piedoj.

Ĉu en la unua frazo sia (anst. lia) kaj en la dua siaj (anst. ŝiaj) ne estus la korektaj formoj? (X.)

48. Refleksivo.

Kion vi diras pri la korekteco de tiu ĉi frazo: „Henriko atendis pli bonan rekompencon pro (por, de) sia diligenteo.“ Ĉu ne lia? Zamenhof en FK (La karaj braceletoj, pĝ. 144) skribis: „... dum la dukino en la domo maltrankvile atendis la reporton de ŝia braceleto.“ (H. B.)

49. Participo en nominativo aŭ akuzativo.

„Kelkaj el ili... familioj, personoj kiuj plej ofte ne scipovis ilin uzi sed gardis ilin enŝosigitajn kiel trezorojn...“ Ĉu ne „enŝosigitaj kiel trezorojn“? Tiun ĉi frazon mi ĉerpis el „Anstataŭa edzino“, p. 17 supre. (X.)

50. Konjunkcio: ke.

En Germ. Esperantisto n-ro 12, 1931, p. 184, mi legis en recenzo pri Gajaj Vesperoj de C. Walter la sekvantan frazon: Sed mi tute ne povas kredi, ke Prof. Christaller lasis nekorektita ekz. „Vi diras, ta bildo kostas 100 000 markojn“ (sen „ke“). — Kion vi pensas pri tio? (L. G.)

51. Nek.

„Estis varmege; nek unu arbetoj donis freŝigan ombbron.“ Laŭ mia opinio en supre citita frazo la vorto „nek“ estas neĝuste aplikita anst. „eĉ ne“. Via opinio? (L. G.)

52. Akuzativo.

En iu traduka tasko mi uzis la jenan esprimon: „Dum legado libron mi konstatis ke...“ Mia instruanto asertas ke la esprimo „legado libron“ estas nekorekta, kaj ke mi devas skribi: „Dum legado de libro“, aŭ: „legante libron“. Ĉu ĉi estas prava? (E. Sch.)

53. Substantivo participa.

Ĉu oni povas diri: „la venkinto de la batalo“? (A. J.)

54. Jus — ĝuste — rekte.

Ĉu en la frazo: „Oni donis la medikamenton jus antaŭ la atako de l' febro“ la vorto „jus“ estas ĝuste uzita, aŭ ĉu oni devas uzi aŭ „ĝuste“ aŭ „rekte“? Ĉu „jus“ entute povas stari apud as-formo, ĉar ĝi signifas en germana lingvo: soeben, gerade; en franca (laŭ Of. Klas. Libro): à l'instant (dans le passé); en angla (laŭ „The Edinburgh“): just (past). El tio ŝajnas rezulti, ke „jus“ estas aplikibla nur ĉe is-formo. Tamen, ankaŭ „ĝuste“ ne estas uzibla en supra frazo anstataŭ „jus“. Ĉu eble „rekte“ pli taŭgas, kvankam ĝi havas ĉefe lokan signifon? (B. K.)

Respondoj.

7. Antaŭ ol — antaŭ kiam.

Ion tro malforta ŝajnas la rimarko en la koncerna respondo (L. Kr. n-ro 2), ke la uzo de „antaŭ ol“ estas sankciita de la kutimo. Efektive ĉi tiu uzo apartenas nedisigible al la fundamentaj dokumentoj de la lingvo mem; do „antaŭ ol“ estas fundamenta formo (malantaŭ ol, aŭ post ol estas ĝia inverso) kaj, kiel tio, absolute nekritikebla. Kompreneble tio ne malpermesas individuan

uzon de „antaŭ kiam“ laŭvole; sed estus nepravigeble, konsili al la lernanto ne uzi „antaŭ ol“ aŭ „malantaŭ ol“, kiuj cetere estas por la orelo pli belaj ol „antaŭ kiam“ kaj evitas tro oftan uzon de la sono „k“.

(J. E. B.)

44. Participo: -ata aŭ -ita.

Ambaŭ formoj estas pravigeblaj, kvankam ni preferas dronigita. Sed kiu estas la pli korekta, tio dependas de la vidpunkto de l' skribanto de la frazo.

Dronigata:

Ortrezoro pereis kun la ŝipo, kiam (dum) ĝi estis dronigata.

Dronigita:

Ortrezoro pereis kun la ŝipo, (post) kiam ĝi estis dronigita; aŭ:

Ortrezoro pereis kun la ŝipo, kiu (nuntempe) estas dronigita.

45. Se — ĉu.

Laŭ nia opinio, en la cititaj modelfrazoj se estas erare uzita. Korekte ili devas teksti:

Mia feliĉo dependas de tio, ĉu mi edziĝos kun ŝi.

Depende de tio (laŭ tio), kiel li al mi respondos.

Laŭ tio, ĉu la vetero estos bela aŭ malbela, ni iros promeni aŭ ne. (Ĉu la vetero estos bela ĉu malbela, ĉiukaze ni iros promeni.)

La sencon de la lasta frazo en la demando ni ne komprenas.

46. Prepozicio: al.

La uzado de al post preferi estas kutima; malofte oni trovas preferi ol. Sed kiu scias klarigon por tiu uzado? (Ni petas, nepre koncoize!)

47. Refleksivo.

En la unua frazo la vortoj „pri lia veremeco“ dependas de pensebla (logika) subjekto entenata en „dubo“ (= oni dubas), kaj la pronomo „lia“ ne estas refleksiva al tiu subjekto („oni“).

En la dua frazo la vortoj „sub ŝiaj piedoj“ dependas de la logika subjekto „planko“ (la planko kvazaŭ tremis sub ŝiaj piedoj), kaj la pronomo „ŝiaj“ ne estas refleksiva al tiu subjekto. Sed en tiu ĉi frazo oni povas pravigi ankaŭ „siaj“, dependigante „sub ŝiaj piedoj“ de „Cara sentis“:

Cara sentis la plankon (tremi) sub ŝiaj piedoj. (Tiukaze la pronomo estas refleksiva al la vera subjekto „Cara“. Pli klara tio fariĝas, se oni ŝanĝas la vortordon: Cara sentis sub ŝiaj piedoj tremi la plankon.) Komparu ankaŭ: Cara sentis la plankon tremantan sub ŝiaj piedoj; sed: Cara sentis la tremantan plankon sub ŝiaj piedoj.

48. Refleksivo.

Se „sia diligenteo“ rilatas al Henriko mem, la frazo estas korekta; se la diligenteo rilatas al alia persone, ekz. al frato aŭ amiko de H., korekta estas: „lia“. — En

„La karaj braceletoj“ vere oni trovas la cititan frazon, sed sur la sama paĝo oni trovas ankaŭ: „... la edzino ... atendis la redonon de siaj multtekostaj juveloj“. Do, ŝajnas ke en la do vi citita frazo la formo „ŝia“ estas preseraro.

49. Participo en nominativo aŭ akuzativo.

Laŭ nia opinio, tio tute dependas de la senco, kiun la aŭtoro (aŭ tradukinto) volas doni al la esprimo. La formo „gardis ilin enŝlositajn kiel trezorojn“ signifas: „gardis ilin, kiuj estis enŝlositaj kiel trezorojn“; la dua signifas: „gardis ilin je enŝlosita formo, kiel trezorojn (aŭ: ĉar ili estis trezorojn). Ankaŭ la restantaj du formoj estas pravigeblaj: enŝlositaj kiel trezoroj, kaj: enŝlositajn kiel trezorojn.

50. Konjunkcio: ke.

Ni pensas ke ambaŭ estas pravaj: la aŭtoro (aŭ kontrolinto) kaj la recenzinto. Se

post „vi diras“ oni metus dupunkton anst. koma, la frazo estus tute neriprocebla, kvankam la efeko por la ordo estus la sama. Do, bagatelo, kiun menci en recenzo apenaŭ ŝajnas necesa.

51. Nek.

„Nek“ povas esti aplikata nur kune kun dua negacio: nek—nek, ne—nek, neniu—nek, ktp., ekzemple:

Nek luno nek steloj brilis.

Mi ankoraŭ ne estis en Parizo nek en Londono.

Neniu anglo nek germano ĉeestis la konferencon.

Plej ofte oni trovas la nekorektan aplikon de „nek“ anst. „ĉe ne“ ĉe slavaj samideanoj, same kiel la aplikon de l' refleksivo ĉe la unua kaj dua personoj (mi aŭ vi razas sin), „kiamaniere“ (anst.: kiel, kiumaniere, kiamaniere).

52. Akuzativo.

La uzita formo estas teorie pravigebla (vidu ankaŭ la artikolon de G. Schattat en L. Kr. n-ro 12), sed apenaŭ uzata. Ni rekomendas eviti ĝin kaj preferi uzi la formon kun „de“ aŭ participon „legante“.

53. Substantivo participa.

La esprimo sonas en la unua momento kontraŭlogike. Oni atendas: „la venkinto en la batalo“, ĉar estas eble, venki malamikon, sed ne batalon, kiun oni povas nur „gajni“ (aŭ malgajni, perdi). Pli evidenta fariĝas la kontraŭlogikeco en „la venkinto de multaj bataloj“. En la substantivo „venkinto“ tro multe sentiĝas ankoraŭ ĝia deveno de la verbo „venki“. Tamen, la esprimo eble estas pravigebla, se oni forgesas por momento konsideri la verbecon de „venkinto“. Senhezite ni diras „la venkinto de Waterloo“, kion oni povus klarigi: „la venkinto (en la batalo) de Waterloo“.

JULIO BAGHY: DANĜERA VOJO.

Ni volonte publikigas la sekvantan artikolon de s-ro Julio Baghy pro la graveco de la aŭtoro kaj de la temo. Ni bone konscias, ke ĝi kaŭzos diskutajn kaj polemikajn, kaj pri iuj punktoj kaj faktaj asertoj ni devas eldiri rezervon; sed ni opinias, ke la diskutoj, tenataj en certaj limoj, povas nur utili, almenaŭ por montri la opinion de la plimulto, kiu, en socia afero, kia ja estas lingvo, pli valoras ol ĉiuj teorioj.

Senescepte ĉiu lingvo estas elmetita al la evoluo. La evoluo povas esti sana, do laŭbezona, aŭ nenatura, sekve pli malpli altrudita. En la historio de preskaŭ ĉiu lingvo, nomata kulturlingvo, oni retrovas la bonajn kaj malbonajn rezultojn de la nenatura evoluo. La nenatura evoluo estas sekvaĵo de la literatura evoluo. Ĝiaj pioniroj estas la verkistoj, poetoj kaj lingvistoj.

Duspeca nenatura lingva evoluo ekzistas:

- lingvokulturo, respektanta la bazajn elementojn de la lingvo kaj klopodanta riĉigi la vortaron per novaj vortoj aŭ gramatikaj formoj per vortfarado aŭ parolturnoj, prenitaj el la popola lingvo;
- lingvokulturo, malmulte konsideranta la popolan lingvon kaj pli malpli skrupule akceptanta fremdajn elementojn, laŭmodajn novajn vortojn, nepripensitajn novajn gramatikajn formojn.

La evoluo, okazanta laŭ principoj de la unua lingvokulturo, entenas malpli da danĝero kaj ĝi povas servi bonege al la kristaliĝo de la lingvo; ĝi konservas la originalan ĉarmon, pliiĝas la internan valoron, edukas tiun moralan forton, kiu donas konscion al la samlingvanoj pri beleco, esprimriĉeco, memstareco de la lingvo. Tiu ĉi evoluo, kvankam ĝi okazas per helpo de la literaturistoj, ne tre diferencas de la natura, antaŭliteratura, sed ĝi estas konscie celhava kaj enbenas ĉiun faktoron de la sana evoluo.

La evoluo laŭ principoj de la dua lingvokulturo havas jenajn karakterizajn ecojn: forgesemo pri lingvaj tradicioj, facilanima akcepto de ĉio nova, personaj gusto kaj prefero pro ambicio „formi kaj reformi ĝis absoluta perfekteco“, senkonscia — kelkfoje eĉ konscia — mortigo de vivantaj elementoj

de la popollingvo. Tiamaniere estiĝas du idiomoj, ofte tute diferencaj, de la sama lingvo: la popola kaj la literatura idiomoj. Tiu ĉi evoluo estas nenatura, altrudita kaj entenanta konstateblan danĝeron por la originala lingvo. Ĝi sentiĝas de ĉarmo originala la lingvon kaj nerimarkate vekigas la nepre necesan respekton kaj amon de la samlingvanoj. La literatura lingvo venkas, sed ĝia triumfarko staras super la kadavro de la popola lingvo. Tiamaniere mortas la spirito de lingvo. En tia kazo la literatura lingvo paradas en fremda vesto, kaj ĝin vivigas — fremda spirito.

La danĝerojn de tia evoluo pli malpli povas kontraŭbatali la popolo mem, vivanta en limigita teritorio sub komunaj kondiĉoj kaj en cirkonstancoj, kiuj faciligas certagradan kunfandiĝon kaj bridas la ambiciajn literaturistojn. La reciprokeco evidentiĝas en kompromisoj: akcepto de dialektaj esprimoj, sintaksaj parolturnoj, specialaj pravortoj en la literaturan lingvon kaj alpreno de novaj vortoj, esprimoj en la popolan lingvon, ofte donante tute alian senco al la vortoj ol ili havas en la literaturo. Malpliigas la danĝerajn sekvojn la historio kaj tradicioj de la popolo, ĉar en ili kaŝiĝas kuntenanta forto.

*

Nun ni rigardu nian lingvon, la artefaritan Esperanton. Kiel la naciaj lingvoj, ankaŭ ĝi estas elmetita al la evoluoj sana aŭ nenatura. Konsiderante la fakton, ke Esperanto estas artefarita lingvo, mi distingas inter ĝiaj periodoj laŭ difinoj, iom diferencaj de tiuj de la naciaj lingvoj, tamen mi riskas aserti, ke la evoluperiodoj de Esperanto ne diferencas de tiuj de la naciaj lingvoj, nur ili en pli rapida sinsekvo okazis ol en la t.n. naturaj lingvoj.

Esperanto estas la plej juna vivkapabla membro de la hindo-eŭropa lingvofamilio. En ĝiaj originalaj elementoj oni rekonas tiujn de ok lingvoj hindo-eŭropaj; du romanaj: franca kaj itala; du germanaj: angla kaj germana; du slavaj: rusa kaj pola, kaj fine du klasikaj: greka kaj latina. La praevoluo de Esperanto okazis parte antaŭ multaj mil jaroj, kaj fine ĝi ricevis sian primitivan formon en 1887. Tiu ĉi primitiva formo entenis absolute vivantajn elementojn, kaj pro tio ĝi povis venki, ĉar ĝi vekis en la unuaj pioniroj la lingvokreemon de la primitiva homo. La simplaj 16 reguloj, la sistemo de la vortfarado per kunmeto de vortoj, per apliko de afiksoj, la minimuma kvanto da vortoj (ĉ. 950 radikoj) incitis la fantazion de la unuaj adeptoj. La lingvo estis kvazaŭ nova ludilo por maturaĝaj idealistoj, alĉenitaj per la nedifinebla „internaj ideo“ al nova kulturmovado, kaj kun streĉita energio ili klopodis forĝi novajn kaj ĉiam plitaŭgajn vortojn, esprimojn per la elementoj de la lingvo. Mia laboro donis vivon al la kruda materialo, iliaj respekto kaj aferamo evidentiĝas en tiu nature sana evoluo, kiu rezultigis la plej vivantajn vortojn de Esperanto.

La aŭtoro de Esperanto malgraŭ la rezigno pri siaj aŭtoraj rajtoj restis la konstanta kreanto de la lingvo, kaj liaj novaj vortoj estis konsiderataj kiel oficialaj. D-ro Zamenhof restis kaj eĉ hodiaŭ li estas la plej alta lingva leĝdonanto en siaj verkoj. Por pruvi tion ĉi, mi rimarkas, ke el la ĉ. 4600 oficialaj vortoj estas nur 40—45 ne-Zamenhofaj. La sana evoluo daŭris ĝis la unuaj postmilitaj jaroj.

Nun mi devas montri al du absolute diferencaj faktoj. Esperanto solvis la problemon de la artefarita lingvo internacia, sed dum sia evoluo ĝi mem fariĝis socia problemo per sia movado. La lingvo ricevis vivon per uzado, sed ĝiaj uzantoj — parte pro la originala interna ideo, parte pro novaj ideoj, utiligantaj la lingvon — iom post iom formos tian socian elementon, kiu pli malpli frue havos certagradan konsideron en la vivo de la homaro. La febra takto de la propagando, la sukcesoj kaj fiaskoj, la penetrado de la lingvo en la plej diversajn sociajn mediojn, la nervema pulsado de la postmilita socia vivo kvazaŭ diktas tian takton al la evoluo de la lingvo, kia povas konduki tiel la lingvon kiel la tutan movadon al — pereoj; al lingvaj skismoj.

Hodiaŭ la lingvo ne vivas plu en la periodo de la sana evoluo, sed ĝi konstateble transkuris sur la vojon de la nenatura. Kiel?

La milito paralizis la movadon por kelkaj jaroj. La refalo, stagno kaj vegetado de la movado erarigis la — lingvokulturantojn. Ili serĉis la kaŭzojn ne sole en la ekster-

movadaj cirkonstancoj, sed ĉefe en la lingvo mem, kiun ili opinias tro malriĉa por la bezonoj de la postmilita, moderna vivo. Ili forgesis, ke ĝuste dum la milita periodo la lingvo akiris pli da vivantecon per la praktika uzado inter la diverslingvaj adeptoj, kiujn la milita sorto kunpelis en komunan tendaron. La granda sukceso praktika de la lingvo ne nur konvinkis ilin pri la absoluta taŭgeco, sed ĝi donis al ili apetiton por la literatura evoluigo, tamen ili respektive konsideris la lingvan tradicion kaj skrupule pesis ĉiun novan vorton el vidpunkto de la neceseco. Tiu ĉi postmilita evoluo jam estis nenatura, tamen ne estis la pli danĝera vojo, montrita de mi sub la punkto b). Ĝi daŭris nur kelkajn jarojn (1918—1925). La transiro al la pli danĝera vojo okazis kvazaŭ nerimarkeble, sed hodiaŭ la evoluo montras kaj entenas detruajn elementojn, kaj estas tempo, ke ni okupu nin pri la problemoj, minacanta nian lingvan unuecon. Se ni forgesis limigi la unuaspecan nenaturan evoluon per fiksado de principoj, nun almenaŭ ni klopodu levi digon fortikan kontraŭ la affluo torenta de la duaspeca nenatura evoluo.

Ni rigardu rekte al la vizaĝo de la realeco por konatiĝi kun la trajtoj de tiu monstro, kiu minacas la vivon de prosperanta movado kaj tiun de parolata lingvo. Tiuj trajtoj ni rekonas en la plendoj de la lingvouzantoj. Ĉiutage plioftiĝas, plimultiĝas la plendoj, kaj fine kelkaj el la lingvokulturantoj mem esprimas siajn skrupulojn pri la danĝeroj. Jen kelkaj el la riproĉoj, akuzoj, malesperaj krioj: „Esperanto fariĝis komplika lingvo“, „la lingvo perdas la unuecon, la kontakton inter la parolata kaj literatura lingvoj“, „ĝi fariĝas baldaŭ nelern- ebla pro la senkrupule akceptitaj novaj vortoj kaj diversmaniere klarigitaj sintaksaj reguloj“, „la nuntempa nuancigo kaj vortara riĉigo detruas jam vivantajn elementojn“, „la novaj vortoj kaj strangaj gramatikaj formoj jam subfosas la Fundamenton“, „la literaturo kreas tian lingvon, kiu ne estas komprenebla sen interpretisto“, „la hodiaŭ jam estas antaŭenfetita bildo de la lingva anarĥio“ ktp. ktp.

Cu tiuj ĉi nigrevidaj asertoj estas pravaj? Senhezite mi riskas opinii: jes, sed ne centprocente. La bonvolaj avertoj kaj protesto povos alvoki la atenton pri la evoluo-problemo, bridi la rapidkurajn ambiciojn, kiuj por riĉa fantazio forgesas pri la ekster-ĉambra realeco. Mi esperas, ke tiel la lingvokulturantoj kiel la simplaj uzantoj de la lingvo baldaŭ rekonsciigos pri la fakto, ke la esperantistaro vivas ne sur limigita teritorio, ne en nacia komuneco, ne sub samaj vivkondiĉoj, ne ligite al samaj historiaj kaj naciaj tradicoj, kaj fine, ke la plimulto ne uzas ĉiutage la lingvon, kaj tial ĝia rapida kaj nenatura evoluo seniluziigas ofte la plej sindonemajn adeptojn.

*

Esperable estas pardoninde, ke mi, simpla unulingvulo, kuraĝas surpaperigi miajn spertojn kaj pensojn pri tiu ĉi „danĝera vojo“. Senkulpigigu min la ofte ripetita argumento de la propagandistoj, ke Esperanto estas kreita ne por la multlingvuloj, ne por tiuj, kiuj havas monon, tempon, okazon kaj specialan talenton por alproprigi kelkajn naciajn lingvojn, sed precipe ĝi celas servi por unulingvuloj, kiuj ekster la limoj de la patra lingvo fariĝus mutuloj sen la posedo de la fonetika, facila kaj belsona Esperanto.

Mia patra lingvo estas la hungara. Ĝi estas senparenca en la oceano de la hindo-

eŭropaj lingvoj, el kiuj Esperanto prenis siajn gramatikajn strukturon kaj vortaran materialon. Antaŭ 22 jaroj mi fariĝis adepto de la lingvo. Min kaptis nur la ideo kaj ne ĝia beŭeco, pri kiu mi konsciis nur post jaro, kiam la nura kompreno de la teksto ne plu kaŭzis penan laboron por mia menso. Mi bone memoras pri la ĝojo kaj admiro, kiujn mi havis eĉ pro bagatelaj vortkunmetoj, parolturnoj, en kiuj mi rekonis la vivopovon de la lingvo, la kaŝitan belecon, sukcesan fortostreĉon kaj la iluziplenan progresemon de la homa intelekto. Mi ekamis la lingvon, uzis ĝin skribe kaj buŝe. Ĝi fariĝis mia dua lingvo, kiam mi parolas preskaŭ tiel bone kiel mian patran. Dum la lastaj 15 jaroj mi uzas ĝin ĉiutage parolante pri diversaj temoj en plej diversaj medioj aŭ legante verkojn, eldonitajn en tiu ĉi lingvo. Malgraŭ ĉio ĉi mi konstatis, ke ĉiam aperas novaj lernindaj vortoj. Ne grave! Ili estas bezonataj fakvortoj, mi konsolis min. Subite antaŭ kvar-kvin jaroj la novaj vortoj plimultiĝis, dum legado ĉiam pli ĝenis en la tuja kompreno, kaj mi ne kuraĝis ek- sidi por legi sen apudkuŝanta vortaro de Boirac. Mi ne estas profesia lingvisto, do mi ne sentis min kompetenta juĝi pri la vortoj. Senhezite mi lernis ilin kaj kelkajn, nepre necesajn, mi mem uzis. Sed la surprizaj novaĵoj ne plu forestis. Ĉiu nova verko, ĉiu nova numero de gazetoj alportis amason da vortoj nekonataj, kaj por resti moderna — mi ĉiutage lernis, lernis aŭ mi estus lerninta, sed bedaŭrinde multaj vortoj restis enigmoj antaŭ mi. Nekk la vortaro de Boirac, nek tiu de SAT entenis klarigojn pri tiuj novaj vortoj. Cetere jam delonge mi rimarkis, ke tiuj novaj vortoj estas bonege anstataŭigebaj per malnovaj vortoj, eĉ per plifruaj neoficialaj vortoj. Seniluziige efikis la konstato, ke baldaŭ mi rimarkis certajn devojiĝojn gramatikajn en la stilo de kelkaj kolegoj, poste tio, ke evidentiĝis tendenco subfosanta jen la sistemon de la vortfarado per la afliksoj, jen la simplecon kaj klarecon de la vortformado. Kompreneble mi zorge evitis utiligi tiajn avantaĝojn.

Antaŭ monatoj okazis ĝena epizodo. Iu transdonis al mi liston de vortoj por ekscii iliajn signifojn. Nu, simple dirite, mi vane traserĉis kelkajn vortarojn. Kion fari? Mi turnis min al samideanoj, kiuj parolas 4—5—9 lingvojn, sed ankaŭ ili esprimis per ŝultrotevo sian nekomprezon. La tragi-komedia punkto de la okazaĵo estas, ke fine mi ekscias, ke tiu vortlisto entenis plejparte la novajn vortojn de tiu revuo, kies ĉef-redaktoro mi mem estas. Fine tiuj vortoj estas troveblaj en la „Poezia Fakvortaro“, eldonita de Literatura Mondo, mi pensis, kaj mi sendigis al mi la verkon. Estas ja honte, ke mi, literaturisto kaj verkinto de kelkaj poemetoj, ne konas la literaturan kaj la specialan poezian vortotrezor- ojn. Mi ne eraris. Parto de tiuj nekonataj vortoj troviĝas en la kolekto de la Poezia Fakvortaro, entenanta precize 609 novajn vortojn. Parto estas neretrovebla en ĝi, nek en la 517-paĝa Plena Vortaro de SAT. Tute prave diras la kompilinto de la nova vortaro: „oni ja povus kompili same aŭ eĉ pli longan liston“ el tiuj vortoj de la Esperanto-literaturo, kiuj estas dissemitaj en gazetoj kaj libroj, aperintaj dum la lastaj 6—7 jaroj.

Mi dediĉis kelkajn horojn al la studado de tiuj ĉi novaj vortoj. Ili estas parte akceptebaj, parte superflujaj, eĉ ekzistas inter ili tute netaŭgaj el vidpunkto gramatika. La unua konstato estis, ke tiu ĉi amaso formas novan balaston kaj pezan ŝarĝon por la

lernantoj, uzantoj de nia lingvo. Poste mi pensis pri tio, kiel ni, verkistoj, embaras- iĝus, se iu kampanaro dezirus la p.c. s. r. plan priskribon de sia veturilo. Ni bone povas manĝi, fristiĝi, devori, pranzi, viktli, sed nomi la partojn de kampara veturilo i. ne kapablas. La vortotrezoro mem de la Plena Vortaro de SAT bezonas almenaŭ dekjaran kaj sisteman prilaboradon por akiri vivantecon, plenan ekzistrajton por multaj vortoj en la lingvo komuna kaj lite- ratura.

Fakvortaro por la poezio! Strange, kva- zaŭ la poezio estus ia ekfernebla metio. La titolo „Poezia Fakvortaro“ facile povas sugesti, ke tiuj vortoj estas nepre necesaj por la poezio kaj ĉiu alia vorto en la lingvo estas neologisma por la vera poeto. La poezio estas arto kaj ne scienco. Fakvort- aron bezonas nur metioj, sciencoj, kaj tiuj artoj, kies helpantoj estas diversaj iloj, in- strumentoj. La lingvo en sia plenejo estas la laborkampoj por la poezio.

Foliumante mi rimarkis, ke la verko spe- ciale favoras tiujn „poeziajn fakvortojn“, kiuj koncernas la subzongan parton de la homoj. Certe ili estas bezonataj vortoj, sed kial nomi ilin poeziaj? Certe ili estas uz- eblaj en literaturaj verkoj, sed . . . Vicigu ilin en aparta kolekto kaj titolu „Fak- vortaro de la necesaj poezioj“! Tiuj vortoj havas ĝustan lokon en la Plena Vortaro, kaj tie ili troviĝas, kompreneble en aliaj formoj. La novajn formojn kreis la rimbezono kaj la ekscitita fantazio.

Eraro estus pensi, ke mi kulpigas la kompilintojn de la Poezia Fakvortaro pro tio, ĉar ili enlistigis parton de tiuj novaj vortoj, kiuj verme mordas la vivantajn foliojn de la lingvo. Tute ne! Certgrade bon- volo gvidis ilin malgraŭ tio, ke ilia subjek- tiva prefero altrudas novan balaston al la lingvo kaj menso. Mi ne kulpigas ilin, ĉar ni ĉiuj, verkistoj kaj parolantoj, estas pli malpli riproĉindaj pri tio, ke Esperanto jam perdis parte facilecon kaj originalecon. Mi kaj ni ĉiuj povas esti dankaj al la kompil- intoj de la Poezia Fakvortaro, ĉar ĝi fine forigis la katarakton de niaj okuloj, vekis en ni la respekton al la lingvo, rekonsciigis nin, narkotitajn de la ŝajna progreso, mon- tris al ni, kiujn vortojn ni nepre devas eviti en la poezio por konservi iom el la origi- nala ĉarmo de nia lingvo.

Por komprenigi la sekvojn de la danĝera vojo kaj por montri kelkajn punktojn de la maskita reformado, IDO-igo, mi penados en la sekvonta numero de „Lingva Kritiko“ prezenti klaran kaj simplan argumentadon.

Vortaraj aferoj.

De John E. Bauman.

Preciza vorto por „eficienco“.

Tre necese estas atentigi la esperantist- aron pri certa danĝero, kiu minacas la pen- on enpenetri la sciencajn kampojn. Ĉiuj komprenas iagrade, ke la tradukoj de vortoj, devas esti precizaj — sed ŝajne ne ĉiu eĉ iomete komprenas, ke estas tre danĝer- bazi la tradukon sole sur la deveno de la vorto, sen konsidero de la preciza ĉi-tia ra- nuanco de la vorto.

Frapanta ekzemplo estas la tre grava vorto „eficienco“. Vane la skribanto serĉis taŭgan tradukon por ĉi tiu en la vortaroj. Ili ĉiuj traduktis la originalan sencon,

„efiko“. Sendube tio estis la senco, kun kiu la nomita scienca termino komencis sian vivon, sed nun ĝi havas forte specialigitan kaj trege precizan signifon. Je la profunda miro de la skribanto multaj personoj ŝajne ne povas ekkompreni tion. En la pli mallarĝa scienca uzo la vorto signifas la laborkvanton liveratan de la maŝino por ĉiu unuo de laboro enmetita. La unua duono de la difino sin trovas en kelkaj vortaroj: la elmeto; sed la ideo de rilato (matematika raporto) de elmeto al enmeto ŝajne ne estis komprenata.

Tamen, konsideru grandan maŝinon — elpensitan por elfosi grundon —, funkciigotan de alia maŝino. Supozu la lastan esti malgranda elektra motoro bonstila. Ĉu ĝi havas grandan efikon ĉe sia tasko? Tute nel Ĉu ĝi liverus grandan forton, aŭ kvanton da laboro? Ĉiom ne. Tamen ĝia efico estus granda, eble 85—95%. Anstataŭigi ĝin per giganta vapormaŝino — kia grandega potenco, laborliverado, efiko! Sed ĝia efico estus multege malpli granda, ol tiu de la eta elektra motoro, malpli ol 20%. La elektra motoro elmetas preskaŭ la tutan potencon, kiun ĝi ricevas — alta efico. La vapormaŝino senutile kiel varmon malŝparas la plejon de sia ricevita potenco. Oni povus munti dekkvarcolan militŝipan pafegilon por mortpafi muson — tio estus tre efika, se oni bone celus, sed ĉu ĝi estus efica? Oni povus forbruligi sian domon por purigi ĝin de litcimoj, kaj la manovro bone efikus, la ĉimoj pereus aŭ migrus, sed ĉu tio estus efica? Intence mi uzis ĉi tiujn du lastajn ridindajn ekzemplojn, ĉar eble ili plej forte frapas la atenton de tiuj, kiuj nun persiste vidas nenan gravan diferencan inter efiko kaj efico. Ankaŭ ili montras ke, kiam ni uzas la vorton „efico“ en pli larĝa senco pri planoj kaj procedoj anstataŭ maŝinoj, ni tiam celas la maksimumon de efiko (kun la minimumo de peno aŭ maldezirindaĵoj. Ĉu ne tendencas senkreditigi nian aferon en la okuloj de scienculoj, ke tiel multaj niaj vortaroj tradukas „efico“ per „efiko“?

Kion fari? Por respondi ĉi tiun demandon, mi skribis ĉi tion. Ni devas aŭ uzi „efico“ aŭ fari kunmetaĵon el Esperantaj radikoj. La lasta estas ne facila sen maloportuna ĉirkaŭfrazo. „Laŭpenoefiko“, kiu mi pene elpensis, mezbone indikas la ideon de efico, sed la pliampleksa uzo de la vorto en ĝeneralaĵ kleraj rondoj devas esti konsiderata. „Kompetenta“ ne esprimas la saman nuancon; kompetentulo kelkfoje malficience laboras, en la praktiko. En la pliampleksa senco, efico signifas, per si mem, altan gradon de efico. Efico enca programo devus tradukiĝi, tial, al laŭpenoefika (preskaŭa egalulo de tagnokte-egaleco). Kial ni uzi „efico“? La sola kontraŭaĵo estas, ke ĝi ne estas tre internacia vorto krom en teknikaj kaj aliaj rondoj. Tamen sendube estos la plej bona afero, ĝin tuj enmeti en ĉiujn lernolibrojn kaj vortarojn, konsiderante la ĉiutage kreskantan penetron de fundamentaj teknikaj ideoj en nian modernan vivon. Eĉ tuj, por la propaganda efiko, tio devus esti farata. Ĉu ktera esperantisto povas toleri, ke scienculo, kiun li volas fari serioze interresata en Esperanton, trovi en ties vortaroj tradukprovon montrantan ĉe la tradukistaro kompletan miskomprenon de la efektiva signifo de unu el la plej gravaj kaj ordinaraj sciencaj ideoj?

(N. B. En la scienca lingvo la vorto estas „efikivo“.)

„Vi“ kaj „ci“.

Tro disvastigita estas la kutimo, en anekdotoj, serĉoj, kaj artikoloj (eĉ en Heroldo!) uzi „ci“ antaŭ „vi“ tute sen justigaĵo. Tio minacas finfine tiri la esperantistaron en la malgajajn nacilingvan fuŝon koncerne la demandon, kiun pronomon de la dua persono estas permeseble aŭ devige uzi. Zamenhof mem klare diras ke, havante specialan pronomon de ĝentileco en sia unua Esperanto, li forĵetis ĝin ĝuste por malebligigi, ke Esperanto iam tiel embarasu la lernanton kiel nun la lingvoj germana, hispana, itala, ktp. Ni zorge sekvu lin! Li ne donis „ci“ por preni la lokon de „thou“, „du“, „tu“, „vos“ ktp. en ordinara aŭ eĉ, krom raraj esceptoj priskribotaj, en neordinara parolo aŭ skribo. Tra la dua Malnova Testamento li senescepte uzis „vi“ en ĉiuj okazoj, ĉu familiaraĵ, ĉu solenaj. En la Plena Gramatiko li ne donis „ci“ inter la personaj pronomoj — estis la idistoj, kiuj faris tiaspecan fuŝon! Li evitis ĝin!

Estas nur du specoj de kialoj por uzo de „ci“. Esperanto devas kapabli traduki ĉion — en certaj naciaj lingvoj la ŝanĝo de uzata pronomo de (aŭ por) la dua persono montras ŝanĝon de sentimento al la familiara aŭ la malfamiliara. Tiam la esperantisto povas traduki tiaĵojn per „ci“ — ekz. en la F. K. p. 396, l. 2: Saŝiĝis „vi“ per „ci“, ktp.

En la dua speco de uzo oni volas indiki, ke la uzanto aŭ estas ridinde ceremonia, aŭ surprize familiara, aŭ montras malestimon (ekz. Mob en la romano, „La amo en la jaro dekmil“); „ci“ povas ĉi tie servi. Sed por ĉia alia skribado kaj parolado nepre uzu nur „vi“, kara esperantisto. Alie fari pro nacilingva kutimo estas ja grava kaj apenaŭ pardonebla pekto kontraŭ la libera demokrata spirito de nia kara lingvo. Zorge pripensu tion!

Uzo de „aĉ“ por certaj vortoj.

Kvankam „aĉ“ jam estas foje trovita, tamen efektive sin trovas okazoj, kie ĝi ne uzigaĵe ĝuste tiam, kiam ekzistas bonaj kialoj por ĝi. Ekzemple, „dorloti“ kaj „volupta“. Kutime la vortaroj donas por ĉi tiuj vortoj aĉan signifon — tamen laŭ la uzo en la F. K. kaj ankaŭ laŭ ordinara prudento oni povas tiuj kompreni, ke ordinare ili havas ne aĉan signifon. Tial la vortaroj devus doni nur la ne-aĉan signifon, kaj por la aĉa signifo uzi la sufikson „aĉ“. Se oni alĝuas la aĉan nuancon al la radikoj mem — kiel ĝin depreni, kiam ĝi ne estas la senco bezonata? Sed oni ĉiam povas aldoni — „aĉ“ por krei „aĉan“ nuancon, kie tiu lasta deziriga.

Propozicio, frazero kaj klaŭzo.

Niaj vortaroj estas bedaŭrinde malprecizaj pri du ideoj rilate al la scienco de lingvoj. Kiam oni, ekzemple, volas esprimi ion pri fraza konstruo, oni tuj trovas, ke la deksikon-farintoj ne klare diferencigis du tre diferencajn aferojn. Ekz. anglaj-Esperantaj vortaroj tradukas la anglan vorton „phrase“ per la sama vorto kiel la vorton „clause“, nome per „frazero“. Tamen „phrase“ konsistas el „vortoj rilatigitaj laŭ senco, sed ne, solaj, esprimantaj penson“. „Clause“ havas subjekton kaj predikaton, asertas ion kaj esprimas, tial, penson, kvankam ĝi estas nur parto de frazo. Kia grandega eraro traduki tiajn vortojn per sama Esperanta vorto! Kion la „phrase“ ne povas fari kaj resti „phrase“, la „clause“

devas fari aŭ ĝi ne povas esti „clause“! Tiaj konfuzoj, ĝene oftaj en ĉiuj nacilingvaj-Esperantaj vortaroj, forte tendencas senkreditigi Esperanton en la okuloj de ĝiaj prikonsiderantoj, kaj precizaj vortoj estas tre farendaj.

Estus bone uzi la esprimon „frazero“ sole por la unua ideo kaj, por la dua, aŭ permesi uzon de la vorto „klaŭzo“ en ĉi tiu senco, aŭ limigi, en gramatikaj rilatoj, la uzon de la vorto „propozicio“ al la dua senco. „Subfrazo“ sin trovas en kelkaj vortaroj, sed ĝi povus tro facile kaŭzi konfuzon inter dependaj kaj sendependaj „klaŭzoj“ aŭ propozicioj.

LINGVA TRIBUNO

Pli bona stilo per dispartigo de longa frazo.

En artikolo „Frateco kaj paco de la mondo“, presita antaŭ jaroj, mi trovis la jenan malfacile kompreneblan frazejon:

„Ĉiu nacio, vindita en la vindotukoj de malnovaj ideoj, tradiciaj politikoj, heredaj suspektoj, ne kuraĝas eniri la heredon de paco, prospero, libereco, timante aliajn naciojn, supozante, ke la resaniĝo de alia popolo signifas vundi sin mem, ne povas vidi la vastan arbaron de homaro pro la arboj de sia propra egoismo.“

Tiu ĉi frazejo fariĝas pli bonstila kaj facile komprenebla per dispartigo je tri malpli longaj frazoj:

„Ĉiu nacio estas vindita en la vindotukoj de malnovaj ideoj, tradiciaj politikoj kaj heredaj suspektoj. Tial ĝi ne kuraĝas eniri la heredon de paco, prospero kaj libereco, timante aliajn naciojn kaj suspektante, ke la resaniĝo de alia popolo signifas vundi sin mem. Ĝi ne povas vidi la arbaron de homaro pro la arboj de sia propra egoismo.“

Do, gesamideanoj, mia konsilo: evitu longajn frazejojn kaj, anstataŭ unu malfacile komprenebla, malbonstila frazmonstro, preferu tri-kvar mallongajn, bonstilajn kaj facile kompreneblajn frazojn. T. J.

Kompreni.

Oni ne komprenas frazon diritan, se oni ne havas ĝustan ideon pri la senco de ĉi tiuj vortoj (Plena Vortaro), ĉu pro nekompreneo de la lingvo, ĉu nur de la celo de ĉi tiuj. Sed kiam oni ne „komprenas“, ĉar oni ne bone aŭdis la vortojn, oni ne povas diri: „Mi ne komprenas.“ Mi jam sufiĉe spertis, ke tio nur igas la alian klarigi la frazon, anstataŭ ripeti ĝin. Pro tio kelkaj lingvoj uzas ĉi tie apartan verbon; germane: verstehen; nederlande: verstaan. La franco diras nur: entendre (aŭdi); la anglo tute konfuzige uzas: to understand (kompreni). Kion oni devas diri Esperante? „Kompreni“ estas nepre malkonsilinda, kiel mi jam argumentis. Ĉu kunmetita vorto „bonaŭdi“, „ĝustaŭdi“, „elaŭdi“ aŭ io simila sufiĉe taŭgas? F. J. B.

Eldonejoj

de novaj Esperanto-gramatikoj, vortaroj kaj similaj libroj prilingvaj, dezirantaj specialan kritikon pri tiuj libroj en „Lingva Kritiko“, estas petataj sendi po unu ekzemplero al la ĉefredaktoro s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo.

Ni atentigas speciale, ke temas ne pri recenzoj, sed pri serioza kritiko de libroj prilingvaj, do ne de verkoj beletristikaj k. s. m.